

# Eŭropa Bulteno

Marto/aprilo 2017, Numero 169

## TRE GRAVA NOVAĴO POR EŬROPAJ ESPERANTISTOJ



Malgraŭ grandaj labordevoj, la eŭropa komisionano Vytenis Andriukaitis akceptis la inviton de la estraro de EEU veni al nia konferenco organizata kune kun GEA dum la kongreso en Freiburg kaj prelegi pri Zamenhof. Tio estas granda ofero por la E-movado kaj montras lian pretecon subteni nian movadon malferme kaj praktike. Neniam ĝis nun iu tiel alte poziciata funkciulo de EU vizitis iun nacian E-kongreson kaj Eŭropan E-konferencon. Post lia pasintjara partopreno en la konferenco de Nitra kaj UK, li venas al ni la duan fojon. Dum lia partopreno la estraro de EEU havos kunvenon kun li kaj diskutos pri komunaj projektoj, kiujn EEU planas entrepreni kaj sen lia helpo estas nerealigeblaj. Ni kredas ke ni trovos konkretajn punktojn inter niaj tri pripensitaj proponoj por atingi celojn kiuj iamaniere enplektas la Eŭropan Komisionon en agadon, kiu signifus ke ĝi traktas E-on serioza socia projekto inda esti traktata.

Ni invitas esperantistojn kiuj ŝatus eluzi tiun ĉi okazon kaj konstrue partopreni en serĉado de solvoj kaj subteno al Andriukaitis en liaj klopodoj, veni al la konferenco en Freiburg.

Zlatko Tišljarić

## **ASEMBLEO DE EEU KAJ EŬROPA KONFERENCO “ZAMENHOF-ANTAŬULO DE HOMAJ RAJTOJ”**

Ĉar estas nur unu monato antaŭ la ĉefa jarkunveno de EEU, ni ripetas informojn kaj inviton alla Germana Esperanto-Kongreso en Freiburg.

En 2017 ne okazos aparta kongreso de EEU sed nur kunvenoj de la asembleo kaj aparta konferenco dediĉita al Zamenhof pro 100-jariĝo de lia morto. Tio okazos kadre de la ĉi-jara kongreso de Germanaj Esperantistoj en Freiburg (suda Germanio).

Ni invitas ĉiujn membrojn de la asembleo de EEU aliĝi al la kongreso kaj veni al niaj aranĝoj sed ankaŭ partopreni en la programoj de la Germana E-kongreso.

Programoj rilataj al EEU dum la kongreso:

1. Eŭropa konferenco “Zamenhof – antaŭulo de homaj rajtoj” (la 3-an de junio: 10-12-a horo) kun enkonduka prelego de eŭropa komisionano Vytenis Andriukaitis kaj prelegoj de Ulrich Bradenburg kaj Zlatko Tišljär
2. Asemblea kunsido (nur por la asembleanoj) al kiu la asembleanoj estis aparte invititaj (la 4-an de junio: 9-11-a horo)
3. Asemblea kunveno por la ĝenerala kongresanaro: Perspektivoj de Esperanto en EU post Briteliro” (la 4-an de junio 14-16-a horo)
4. Raporto kaj diskuto pri la okazintaj aranĝoj kadre de la eŭropa projekto “Rakontoj pri rememoroj”, memore al rifuĝintoj pro Jugoslavia milito 25 jarojn post la militkomenco, kiun kunordigas EEU (la 4-an de junio: 16,15-17,30 horo)

Detalaj informoj kaj aliĝoj: <https://www.esperanto.de/de/enhavo/gea/94a-germana-esperanto-kongreso-2017>

Maja Tišljär

## **AKTIVECOJ KADRE DE KAMPANJO »ZAMENHOFA JARO«**

### **1. ZAMENHOF-OMAĜO EN BERLINO**

En Berlino ni memorigis la 100-an mortotagon per "Zamenhof-Omaĝo" en la semajnfino de la 21-a ĝis 23-a de aprilo. Partoprenis entute kvindeko da homoj, el Germanio, Danio, Pollando kaj Aŭstrio.

#### **Simpozio en la Pola Instituto de Berlino**

En la komenca vendredo okazis Scienca Simpozio en la Pola Instituto de Berlino. La prelegojn prezentis prof. Sabine Fiedler (El la vivo de ŝajne morta lingvo), d-ro Ulrich Lins (La ŝanĝiĝo de la bildo pri Zamenhof), d-ino Agnieszka Jagodzińska (La respondo de Zamenhof al la "Juda demando"), Bernhard Pabst (Zamenhof kiel juristo) kaj D-ro Philipp Sonntag (Esperanto - la venontaj cent jaroj); la prelegoj plejparte okazis germanlingve, unu anglalingve. Sekvis podia interparolado pri vivo kaj verko de Zamenhof, en kiu partoprenis la historiisto d-ro Ulrich Lins, la lingvisto d-ro Cyril Brosch kaj Chuck Smith, la kunfondinto kaj teknikestro de la nova saĝtelefona socia reto "Amikumu", konata ankaŭ kiel gvidanto de la Duolingo-Esperanto-teamo.



### Koncerto de Kaŝi, Suzana Ka kaj Stephan Schneider

En sabato ekskursemuloj buse rondveturis tra Berlino al lokoj ligitaj al Zamenhof kaj Esperanto, ĉe kio sperte gvidis Fritz Wollenberg. Vespere en la kulturcentro "Danziger50" okazis koncerto, en kiu prezentiĝis tri muzikistoj - Kaŝi el Hamburgo, Suzana Kornicka el Poznano kaj Stephan Schneider el Berlino. Dimanĉmatene partoprenantoj kaj pliaj berlinanoj renkontiĝis en la arabstila restoracio Al Hamra por komuna matentagmanĝo kun multa babilado.

Lu Wunsch-Rolshoven

## 2. ZAMENHOF-FESTO EN ESPERANTO-URBO

### Evento-serio en Herzberg okaze de la Zamenhof-memorjaro

Okaze de la 100-a mortodatreveno de Zamenhof la planadoj por digna festado en Herzberg komenciĝis jam en somero 2016. Pro la fakto, ke la rekomendo je internacia memorfestado estis sur la agadlisto de UNESCO ni petis subvencion, tamen la germana UNESCO-komitato ne akceptis tion. Do, la Esperanto-urbo Herzberg kaj la Esperanto-Centro mem organizis diversajn agadojn.



Inter 7-9 de aprilo 2017 la Germana Esperanto-Centro, Klerigejo de GEA ofertis **specialan fakseminaron pri Zamenhof**, kie ni traktis la ekeston de lingvo Esperanto, verkojn de Zamenhof, liajn poemojn kaj tradukojn, verkojn pri li kaj lia agado.

**La inaŭguro de Zamenhof-placo** estis parto de la tuttaga festprogramo en Herzberg la 8-an de aprilo kun partopreno de ĉ. 75 partoprenantoj, urbaj politikistoj kaj oficistoj, eksterlandaj gastoj. Ĉe la Zamenhof-monumento la anstataŭanta urbestro

Wolfgang Weippert faris prelegon kaj salut-ceremonion kaj poste kun reprezentantoj de la

Esperanto-Centro, Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy kaj prezidantino de GEJ, Michaela Stegmaier, li senvaligis la novajn tabuletojn "Zamenhof-Platz".

**Nova Esperanto-koruso el Halle/Saale debutis dum la inaŭgura ceremonio.** Sepkapa nova koruso, ses virinoj kaj unu viro kun bonegaj voĉoj prezentis kelkajn kantojn en la germana kaj en Esperanto, kantigante ankaŭ la publikon.

### Zamenhof-ekspozicio en la kastela muzeo

Por la jubilea Zamenhof-jaro sur la Esperanto-platforno de la kastela muzeo ni preparis novan fakekspozicion kun multaj materialoj el la kolektaĵo, bilbioteko de la Esperanto-Centro: historiaj fotoj, bildkartoj, libroj, poemoj, medaloj, moneroj, poŝtmarkoj, ktp. pri Zamenhof kaj Esperanto.



### Zamenhof-ekspozicio en la urba biblioteko

En la Esperanto-sekcio de la urba biblioteko ni pretigis ekspozicion el libroj de kaj pri Zamenhof, montrante ekzemple liajn famajn tradukojn, biografiajn verkojn kaj eĉ komikson pri li. La ekspozicioj estos videblaj ĝis vintro 2017.

### Vasta gazetara informado, fotoj el Herzberg

Estas ĝojige ke multaj gravaj germanaj gazetoj, televid- kaj radiostacioj, al kiuj ni sendis informojn jam en marto 2017 ankaŭ nome de la Esperanto-Centro en Herzberg, elektis kiel ĉeftemon la inaŭguron de la Zamenhof-placo, eventon en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo kaj al siaj gazetartikoloj aldonis kiel ilustraĵon bildon de la tiea Zamenhof-monumento.

La ŝtata germana gazetara agentejo (DPA) pretigis longan intervjuon kun Peter Zilvar,

sendis fotoraportiston al Herzberg kaj en la tago de la inaŭguro de la Zamenhof-placo, la 8an de aprilo 2017 ili aperigis artikolon pri la evento, pri kiu Zsófia Kóródy sendis fotojn al DPA.

Jen listo de ligiloj al la jam kolektitaj gazetartikoloj, televid- kaj radioraportoj:

<http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=70562403>

Ankaŭ sur la urba hejmpaĝo oni trovas kelkajn informojn kun fotoj:

<http://www.herzberg.de/magazin/artikel.php?artikel=3777&type=2&menuid=377&topmenu=7>

Peter Zilvar, Zsófia Kóródy

### 3. POLA PARLAMENTO HONORIS ZAMENHOFON



Dum sia kunsido la 7an de aprilo Sejmo de Pollando, per aklamado, alprenis la decidon pri rememorigo de Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto, respektante liajn meritojn kaj atingojn. La 14an de aprilo estas la 100a datreveno de la morto de d-ro Esperanto.

Necesas rememorigi, ke la 12an de decembro 2016 Urba Konsilio de Bjalistoko rifuzis la proponon nomi la jaron 2017 Jaro de Zamenhof. En januaro 2016 la

konsilianoj de alia pola urbo, Słupsk, alprenis tiun decidon. Ĉiuj datrevenaj eventoj okazas sub aŭspicioj de Unesko.

#### **Enhavo de la decido de Sejmo omaĝi la memoron pri Ludoviko Zamenhof okaze de la 100a datreveno de la morto**

*La 14an de aprilo 2017 estas la 100a datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo Esperanto.*

*Ludoviko Zamenhof naskiĝis, kreskis kaj edukiĝis en la medio de multnacia komunumo de Bjalistoko, kiu iĝis por li inspiro por krei internacian lingvon. Li opiniis, ke la homojn dividas antaŭ ĉio lingva baro, kiu kaŭzas konfliktojn kaj miskomprenojn. Li kredis, ke la ideo de Esperanto unuigos ne nur la esperantistojn, sed ke ĝi ekestos la forto unuiganta ĉiujn homojn. La fina versio de Esperanto, konata en la hodiaŭa versio, estis finita de li en 1885. Kune kun la kresko de populareco de la lingvo Esperanto Ludoviko Zamenhof kiel ĝia kreinto rifuzis ĉiujn rajtojn por ĝi, transdonante Esperanton al la uzo de la tuta homaro. Montrante agnoskon de la kontribuo al ekesto de supernacia lingvo kaj popularigado de ĝi en la mondo, Ludoviko Zamenhof estis en 1905 en Parizo premiita per Ordeno de Honora Legio, kaj en 1913 oni proponis lin kandidato por Nobel-premio. Li mortis la 14an de aprilo 1917.*

*En 2014 pro decido de Ministro de Kulturo kaj Nacia Heredaĵo la lingvo Esperanto estis enskribita en la Polan Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo.*

### 4. ZAMENHOF-ARANĜOJ EN KROATIO



La kroatoj eluzis tre bone la 100-jariĝon de la morto de Zamenhof por publike prezenti E-on kaj la Movadon. Kiel ni jam raportis en januaro kaj februaro estis elsenditaj du televidaj elsendoj en la nacia progamo. Unue TV-Kroatio aperigis 15-minutan elsendon pri supera edukado de Esperanto kaj kulturo (gastis prof. Velimir Piškorec kaj operkantisto Neven Mrzlečki), poste

☞ coveĉanstvu. Jezik se svudio mnogima. Tiojto ga je usvojio nakon samo nekoliko sati učenja i proglasio remek-djelom ruma i logike.

Prvi poklonici esperanta su se zapisivali, a onda odlučili i uživo isprobati njegovu funkcionalnost. Grad Boulogne-sur-Mer u Francuskoj prvi je ugostio Svjetski esperantski kongres, od 5. do 13. kolovoza 1905. Zamenhof je održao nadahnuti govor u kojem je kritizirao ratove i tisućljetno neprijateljstvo među narodima:

"Braća stvorena prema istom modelu, braća koja su trebala pomagati jedni drugima i raditi zajedno za sreću i slavu svoje familije su postala stranci jedni drugima, kao da su se zauvijek razdvojila u neprijateljske grupe, i započela su međusobno vječni rat. Tisućljetna, za vrijeme svog tog vremena, kojeg ljudska povijest pamti, ta su braća vječno međusobno ratovala i uvijek je među njima sporazumijevanje bilo potpuno nemoguće. (...) A sada se prvi puta tisućugodišnja želja počinje ostvarivati."

#### l(l)l(j) jezik l(l)l(j) ideja

Naslučivalo se da se ne radi samo o međunarodnom sredstvu sporazumijevanja, nego o jeziku koji ima ideološku pozadinu. Želja da se na međunarodnim skupovima više ne susreću ljudi različitih nacionalnosti, nego braća koja žive u različitim dijelovima svijeta lijepo je zvučala, ali je, kao što je povijest pokazala, bila opasna za opstanak i napredak međunarodnog jezika. Naime, esperanto je uvijek bio nepoželjan u vrijeme diktatura. Esperantisti su jednako stradavali za vri-

## PIF su osnovali esperantisti

Hrvatska puno duguje esperantu, ali i esperanto nama. Pomoću esperanta je hrvatska riječ prvi put došla u mnoge zemlje svijeta; zahvaljujući prijevodima s esperanta, hrvatska književnost postize velik uspjeh u Aziji. Hrvatska je esperantu dala istaknute dužnosnike u Svjetskom esperantskom savezu, najpoznatiji udžbenik jezika na svijetu "Zagreba metoda" (prilagođen za 40 jezika), književnike, prevoditelje i novi način upotrebe međunarodnog jezika u kulturnoj razmjeni. Naš najstariji festival, Međunarodni festival kazališta lutaka - PIF, koji su osnovali esperantisti i vodili ga nekoliko desetljeća, ove godine slavi pedeseti rođendan!

jeme Hitlera kao i Staljina, ali je esperanto preživio.

Esperanto je imao i zvjezdane trenutke, kad se činilo da će i službeno biti prihvaćen kao međunarodno sredstvo komuniciranja. Iako bi to bio najpošteniji i najefikasniji način komunikacije, pobjedu su odnijele zemlje koje imaju ekonomsku moć - znaju da je jezik i oružje i oruđe: uništavajući jezik, zatire se kultura nekog naroda i nameće svoj način razmišljanja.

Da bi izbjegli politički progon, mnogi esperantisti odlučili su zanemariti Zamenhofovu ideološku pozadinu i posvetiti se samo jeziku. Zbog toga ni esperantski pokret nije uvijek bio jedinstven - jedni su u prvi plan stavljali praktičnost međunarodnog jezika, a drugi ideologiju. Takva previranja postoje i danas, no u svakom slučaju, Zamenhofova ideja u modernom svijetu ima svoje mjesto, a na lingvističkom se planu dogodilo čudo.

U Svjetskom esperantskom savezu brojne strukovne udruge razmjenjuju znanje i iskustvo, sklapaju poslove; državni savezi djeluju u zemljama širom svijeta. Jed-

nom godišnje održava se svjetski kongres, svaki put u drugoj zemlji - ove je godine u Seulu u Koreji, sljedeće u Lisabonu u Portugalu. Zagreb je dvaput bio domaćin esperantskima iz cijelog svijeta: 1953. i 2001.

Svi svjetski jezici imaju izvorište u populaciji koja ih je stvarala i razvijala, živeći zajedno na određenom području. U jezicima je pohranjena povijest naroda, običaji i govor predaka. Jezik je i svojevrsna osobna iskaznica svakog pojedinca. Kod međunarodnog jezika put je obratan: najprije je nastao jezik, a zatim je povezo ljudi širom svijeta, stvorio osjećaj pripadnosti, način razmišljanja, bogatu književnost. Na esperantu se piše i govori, vokabular se stalno obogaćuje, radaju se djeca kojima je on materinji jezik. Esperanto je od planskog jezika postao živi jezik.

Lazar Ludvig Zamenhof umro je 14. travnja 1917. i u Varšavi se u povodu stote obljetnice njegove smrti priprema velika manifestacija. Hrvatska UNESCO-vo godinu posvećenu Zamenhofu obilježava brojnim manifestacijama tijekom cijele godine.



Spomenik Futuro kojeg je Zagreb dobio u povodu Svjetskog kongresa 2001.



Foto: Davor Ključar

la sama televido aperigis 6-munitan elsendon pri Esperanto ĝenerale (gastis Anto Mlinar, Judita Rey kaj Zlatko Tišljar). Sekvis la 14-an de aprilo 2-minuta elsendo pri Zamenhof kadre de TV-Kalendaro. La televido filmis elsendon pri Studenta E-Klubo en Zagrebo kiu estos elsendata. Radio-elsendoj ankaŭ abundis: kroatia radio 1 elsendis unuhoran elsendon dediĉitan al Esperanto „Vojaĝoj tra Kroatio“ kaj radio Sljeme unuhoran elsendon „Kroasan“ dediĉitan al E-verkistino Spomenka Štimec. Loka radio Radio Martin havis unuhoran elsendon kun Judita Rey kies granda parto rilatis al Esperanto. Judita Rey aperigis tripaĝan artikolon en luksa urba revuo Moj Zagreb. Sur la foto afishego sur la domo en Zagrebo en kiu Kroatia E-Ligo havas siajn ejojn.

Zlatko Tišljar

## 5. NACIA KUNVENO DE ITALA ESPERANTO-FEDERACIO EN BREŠO

La 14an de aprilo 1917 mortis nia Majstro L.L. Zamenhof. Cent jarojn poste, lia kultura kaj spirita heredaĵo daŭre instigas nin ĉiujn esperantistojn labori kaj varbi por liaj ideoj kaj lia kreitaĵo. Tio sufiĉas por digne rememorigi tiun elstaran personecon, memkompreneble fare de la esperantistoj sed eĉ flanke de UNESCO, sub kies aŭspicioj en la tuta mondo okazis (kaj la tutan jaron okazos) tiucelaj kunvenoj kaj aliaj eventoj.

Itala Esperanto-Federacio ne maltrafis la okazon. Kunlabore kun Breŝa Esperanto-Grupo, ĝi organizis nacian kunvenon en Breŝo, sub la titolo "Ĉu Eŭropo de supre aŭ Eŭropo de malsupre? La kontribuo de Zamenhof kaj esperanto al la eŭropa konstruo". Patronadis ĝin la Komunumo de Breŝo kaj la Pola Ambasadejo en Italio. La kunveno okazis ĝuste vendredon la 14an de aprilo 2017, de la 10-a ĝis la 13-a horo, en la Salono Piamarta en la urbocentro. Ĝin partoprenis ĉ. sepdek ĉeestantoj, alvenintaj plejparte el norda Italio, sed ankaŭ el pluraj eŭropaj kaj neeŭropaj landoj. Nemaigranda grupo aliĝis al la kunveno el la Internacia Junulara Festivalo.

La ĵurnalistoj de la du urbaj gazetoj fotis la prelegantojn. Luigi Fraccaroli estis intervjuita. Post la enkonduko de la debatmajstro Fabio Larovere (breŝa ĵurnalista kaj profesoro ĉe la breŝa Katolika Universitato), la akceptajn salutojn faris la skabeno de la Komunumo de Breŝo pri rilatoj kun la universitatoj Federico Manzoni, kiu reliefigis la fortan eŭropecon de la urbo kaj dankis IEF-n ĉar ĝi elektis ĝuste Breŝon por okazigi la kunvenon. La prezidantino de IEF Michela Lipari interpretis ĉiujn prelegojn de la itala al esperanto.



La rektoro de la ŝtata breŝa Universitato prof-ro Maurizio Tira parolis pri la internacieco de sia universitato. En sciencaj kaj teknikaj medioj, dank' al la angla lingvo (“jam fakte internacia lingvo”), tiu “Eŭropo de malsupre” jam ekzistas: ĝin konstituas profesoroj, esploristoj kaj studentoj, kiuj interŝanĝas ideojn, spertojn, eblecojn. Nuntempe granda elito de eŭropanoj povas vojaĝi kaj interŝanĝi informojn kaj spertojn tiel, kiel povis fari antaŭ jarcento Zamenhof kaj famaj muzikistoj kaj verkistoj.

Li (kiel inĝeniero urboplanisto) trovis ekzemplojn de la baza eŭropa unueco en la arkitektura stilo de la mezeŭropaj urboj. Li demandis, ĉu vere estas la lingvo la unuigilo de nia kontinento, aŭ prefere estus la moralaj valoroj: super ĉiuj li taksas la valoron, kiun ĉiu eŭropano donas al la homa vivo. Li donis kelkajn ekzemplojn pri tio, kio malhelpas la “Eŭropon de supre”, nome manko de iom da fleksebleco, tro da burokrateco, manko de komuna politiko, komuna defendo, komuna akcepto. Fine li asertis, ke la nura pretervivebleco por ĉiuj eŭropanoj estas la kompleta unuigo de Eŭropo, kaj invitas la esperantistojn (“eŭropismaj ĝis la DNA”) doni sian plej fortan kontribuon al tiu nepre necesa unuiga procezo.

Prof-ro Giordano Formizzi de la Universitato de Verono (IT) prelegis pri “Zamenhof, mondĉivitano” kaj pasie ilustris la kernon de la lia pensmaniero kaj sekve de esperanto. Li substrekis la eksterordinaran antaŭvidemon de Zamenhof, kiu koncipis la novan lingvon kiel ilon por helpi al la unuigo de la homaro. Eĉ li sugestis al la diplomatoj, dum la Unua Mondmilito, ke post la militfino ili - por eviti estontajn interpopolajn kverelojn - rekonstruu la landlimojn per uzo de *neŭtrale geografiaj nomoj* por landoj, kiuj ne prenu sian nomon de la tie loĝantaj popoloj. Formizzi pledis, por ke estu elektitaj al respondecaj postenoj nur homoj, kiuj strebas al la realigo de la komunaj bono kaj belo; li konkludis per alvoko, ke oni ne ĉesu revii pri tiuj celoj kaj ĉiam agu por ilia realigo.

La prezidanto de TEJO Michael Boris Mandirola rakontis pri la vere *eŭropeca* vivo de multaj gejunuloj, kies zamenhofaj valoroj pri “politika justeco absoluta” kaj “ĉiuj loĝantoj plene egalrajtaj” estas la fondaj principoj de Eŭropa Unio. Li opinias, ke sen lingvaj baroj multe pli da homoj sentus apartenon al la sama komunumo, perceptus komunan identecon, parolus pri Eŭropa patrujo. “Mi pensas ke ni faras paŝojn antaŭen por krei la Eŭropon pri kiu Zamenhof revis. Kaj fakte ĉi tiu Eŭropo pli bone kreiĝus ĝuste per Esperanto”.

La prezidanto de la Esperanto-Grupo de Darmstadt (Germanio, urbo ĝemela kun Breŝo) Detlef Haußner prezentis per lumbildoj la aferon de urbaj ĝemelrilatoj, kun speciala atento al la multfaceta agado de sia urbo Darmstadt. Ĝi ĝemeliĝis unuafoje kun Alkmaar (NL) kaj Troyes (FR) en 1958, kaj hodiaŭ kalkulas ĝemelajn rilatojn kun 16 urboj en tuta Eŭropo kaj ankau ekster ĝi. La ĝemeliĝo kun Breŝo datiĝas de 1991. La uzo de Esperanto plifavoras la E-grupojn, do Haußner reliefigis la specialajn rilatojn de sia E-Grupo kun la E-grupoj de la

darmstadtaj ĝemelurboj kaj super ĉiuj kun la Breŝa E-Grupo. Li ankaŭ portis la salutojn al la kunvenintoj de la ĉefurbestro de Darmstadt Jochen Partsch.

Prof-ro Davide Astori de la Universitato de Parmo parolis pri la homarana fratecemo de Zamenhof, kiu interalie proponis la estigon de “Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo” eĉ jam dum la Unua Mondmilito. Lia kreitaĵo estas, laŭ liaj intencoj, la ilo por atingi la celojn de unuiĝo kaj paco; liaj sekvantoj, ni esperantistoj, estas do la daŭraj pioniroj de tiu projekto, ĉar ni gardas kiel niajn proprajn tiujn valorojn de amikeco, respekto, scivolemo al la aliuloj, serĉado de kontaktpunktoj male ol kverelokialoj, kiujn li servis dum sia tuta vivo.

\*\*\*

Post la kunveno, la plimulto de la partoprenantoj tagmanĝis kune ĉe la restoracio “I Dŭ dela Contrada” (*La Duopo de la Kvartalo*), kie ili povis gustumi tipajn breŝajn specialaĵojn en afabla kaj amikeca etoso.



Posttagmeze okazis unika kaj neripetebla evento: Fabio Larovere gvidis la esperantistaron tra la urbaj artaj kaj historiaj ĝuindaĵoj, rakontante per kompetenta sed sprite humura klereco la fonon kaj la detalojn de niaj heredaĵoj; kaj Michael Boris Mandirola esperantigis liajn rakontojn per (persona opinio) *perfekta* traduko, klare elparolita kaj pasie interpretita. Ĉiuj partoprenintoj

ĝuis belegan viziton inter la breŝaj ĉefaj placoj (Placo de la Loĝio, Placo de la Venko, Placo de la Ĉefpreĝejo); poste ni povis eniri la Breŝan Arkeologian Parkon *Brixia Romana*, kies sekretojn la eksterordinara duopo malkaŝis al la ĉeestantoj.

\*\*\*

La fina pritakso de la kunvena tago estas tre pozitiva. La organizantoj kompreneble ne rajtas memlaŭdi, sed ĉio efektive iris laŭplane: la prelegantoj estis altnivelaj, ĉu lokaj, ĉu naciaj, ĉu internaciaj; la prelegoj estis trafaj kaj sencoplenaj; la ĉeestantoj estis atentaj; la tradukoj estis profesinivelaj; la teknika flanko donis neniun problemon; la gazetaro estis digne reprezentita (kaj la postaj artikoloj estis taŭgaj); la tagmanĝo kontentigis ĉiujn samtablanojn, kaj pro la manĝo kaj pro la manĝejo; la turisma vizito gajnis multajn gratulojn al la gvidanto kaj al la tradukinto; la urbo mem bone impresis la vizitintojn. La organizantoj povas plenrajte sin deklari *kontentaj*.

Renato Corsetti

## 6. 19-a ESPERANTO KONFERENCO DE ALP-ADRIA REGIONO

La konferenco okazis en slovenia urbo Brežice de la 22-a ĝis la 23-a de aprilo 2017. Ĝin organizis geedzoj Mihelič kun geamikoj tiel ke ni ne facile ĝin forgesos. Estis agrable kaj en tre amika etoso pro kio ni elkore dankas al la organizantoj kaj deziras al ili plue multajn fortojn. Je la 100-jariĝo de la morto de dr.L.L. Zamenhof ni aŭdis ankaŭ pri sukcesoj kaj malsukcesoj en nia movado en nia pli larĝa ĉirkaŭaĵo. Ni konstatis ke ni preparas sufiĉe



abundan programon okaze de tiu jaro. En estonteco la kunlaboro de la Alp-Adriaj regionoj pliboniĝos kaj ni informos nin reciproke pri tio.



S-ro Morankić el Kroatio atentigis nin, ke ni devas sufiĉe urĝe agi ĉar en Eŭropa Unio oni uzos pliajn naciajn lingvojn kaj estas danĝero ke Esperanto ne povos havi sian rolon. Kroatoj ankaŭ klopodas ke Esperanto estos proklamita nemateria heredaĵo. S-ro Zadavec el

Slovenio proponis ke ni esperantistoj ĉeestu tie kie estas organizitaj grandaj eventoj kaj ni estu aparte videblaj kaj aŭdeblaj. Por tio estas okazo ĉiun jaron kiam la duan dimanĉon en septembro kunvenas homoj de tri landoj sur Peč – kadre de trilanda renkontiĝo. Triestanoj ankaŭ ĉi-jare oragnizos konkurson pri pentrado, nun por junularo kun la titolo »La naturo, fonto de nia vivo«.

En Bjelovar - Kroatio oni preparas INTER-FEST kie de la 6-12a aŭgusto okazos multaj programeroj. Stariĝas la demando: Kiel antaŭen? La respondo ne estas simpla. S-ro Pleadin decidis preni la rolon de la sekvajara organizanto de la konferenco post kiam li ricevos konsenton de sia societo. Tiukaze la ALP-ADRIA kunveno akompanos alian aranĝon en Bjelovar. Laŭeble multe ni aperu en ĉiutagaj gazetoj kun novaĵoj pri nia movado kaj ni ankaŭ reagu al okazaĵoj en la socio ĝenerale rilataj al lingvaj demandoj.



S-ino Doerfler el Italio tre bele prezentis al ni literaturon pri la lasta parto de la vivo de dr. Zamenhof kaj pri la reeĥo en la mondo je lia morto. Ni estas vere fieraj ke ni apartenas al tiel respektata lingva komunumo. Vespera kultura programo, manĝo kaj danco en interesa atmosfero kun amika babilado kompletigis la tagon.

Dimanĉa turisma programo estis neforgesebla. Ĉe la domo de lingvisto Pleteršnik ni eksciis interesajojn, ni aŭdis belajn kantojn de koruso kun nacia akordeono, kaj ni daŭrigis per bongustaj manĝoj.

Nika Rožej

## 7. URBESTRARO DE SŁUPSK ORGANIZIS KONFERENCON OMAĜE AL ZAMENHOF

La 24an de aprilo 2017 okazis la ĉefa E-konferenco en Urbodomo de Słupsk okaze de la 2017



LA ZAMENHOFJA JARO en SŁUPSK sub patronado de Urbestro de Słupsk d-ro Robert Biedroń (esperantisto) kaj Starosto (Distriktestro) de Słupsk Zdzisław Kołodziejski. La konferencon organizis EDE-Pollando kaj Studenta Scienca Rondo de Historiistoj en Pomeria Akademio en Słupsk kaj komencis ĝin la arta programo dum kiu prezentis la E-kantojn la infanensemblo "Słoneczka" / "Sunetoj" kaj junular-koruso "Fantazja" / "Fantazio". Dum la E-konferenco

prelegis i.a.: Urbestro de Słupsko d-ro Robert Biedroń, Kazimierz Kleina kiu reprezentis Parlamentan Grupon de la Lingvo Esperanto, la Honora Konsulo de Respubliko Peruo Kajetan Pyrzyński (esperantisto), prezidanto de EDE-Pollando Eduardo Kozyra (esperantisto), prof. de la angla Shankar Dasgupta (baratano, esperantisto), prof. de la angla el la Supera Ekonomia Altlernejo en Malbork Maria Kozłowska (esperantistino), direktorino Anetta Pawlicka-Dropińska (esperantistino) de la Elementa Lernejo n-ro 7 el Poznań en kiu de du jaroj estas oficiale instruata lingvo Esperanto, prezidantino de Germana Esperanto-Junularo.

Michaela Stegmaier (esperantistino) el la Esperanto-urbo Herzberg, la lasta prezidanto de E-klubo en Słupsk funkcianta dum la jaroj 1956-1998 Henryk Wower (esperantisto), kaj aliaj esperantistoj el Gdańsk, Gdynia, Łowicz, Malbork, Melpin, Olsztyn, Słupsk, Szczecin, Wągrowiec kaj Wejherowo. Post la E-konferenco Senatano Kazimierz Kleina kun Prezidanto de EDE-Pollando Eduardo Kozyra metis florojn ĉe la Zamenhof-monumento kaj ili ambaŭ malkovris dulingvan memortabulon "GRAB ZAMENHOFJA - KARPENO"- la novan ZEOn en Słupsk kun la ĉeesto de kelkdeko da partoprenantoj de la konferenco.

<http://www.powiat.slupsk.pl/769,aktualnosci-2017?tresc=8543>

Eduardo Kozyra

## EŬROPA PROJEKTO KIUN REALIGAS EEU

EEU en 2016 ricevis aprobite eŭropan projekton „Rakontoj pri rememoro“ kies temo estas remeoro pri rifuĝintoj dum la jugoslavia milito 25 jarojn post ĝia komenco. Estas 4 aliaj partneroj el Austrio, Slovenio, Slovakio kaj Germanio. Dum la projekto ĉiu el partneroj organizas en sia urbo ekspozicion de fotoj pri rifuĝintoj dum la Jugoslavia milito kaj de rifuĝintoj nuntempaj en EU. Dum la ekspozicio okazas ankaŭ ronda tablo pri la temo kun ĉeesto de iu viva rifuĝinto el tiama Jugoslavio. La unua kiu realigis siajn devojn estis E@I. En Partizánske estis malfermita solene fotoekspozicio en Popola Kulturdomo je la tago de la liberigo de la urbo. Dum la solenaĵo partoprenis la urbestro kaj aro da politikaj, ŝtataj kaj armeaj funkciuloj. Oni prezentis ankaŭ la libron de Zlatko Tišljar „Eŭropa identeco“ en la slovakia lingvo – tradukita el Esperanto.

Okazis samtage en granda salono de la kinejo diskuto kun rifuĝinto, kiun gvidis Petro Baláž por preskaŭ 200-membra juna publiko el la urba gimnazio kaj teknika meza lernejo. La tuta aranĝo elvokis multan interesigon de la publikaj rimedoj, loka televido, radio, gazetoj...



La aranĝo elvokis la pripensadon de la nunaj generacioj pri milito okazinta pro kresko de internaj naciismoj kaj atentigis ĉiujn ke similaj naciismiĝoj en pluraj EU-landoj povas esti tre danĝeraj por Eŭropo kaj ties popoloj.

La duan aranĝon efektivigis la partnero Asocio por Eŭropa Konscio el Maribor, kiu organizis en du elementaj lernejoj de proksimaj urboj de Aŭstrio kaj Slovenio (Ŝentilj kaj Strass) legadon de

pririfuĝinta libro »Hotelo Zagorje«. La plurdeko da infanoj en ambaŭ lernejoj legis tiun libron ke kroata verkistino Ivana Simić-Bodrožić (en la slovena respektive germana tradukoj) kaj la 28-an de aprilo okazis en Strass prezento de la rifuĝinta kaj milita situacio en Eksjugoslavio far du atestantoj kaj diskuto kun la lernantoj kaj geinstruistoj. La Asocio malfermos ankaŭ la fotoekspozicion fine de majo kaj okazigos rondan tablon en Maribor.

Baldaŭ ankaŭ la du aliaj partneroj realigos similajn programojn kaj dum la Germana Esperanto-kongreso okazos la lasta aranĝo. Tiam EEU kiel la ĉeforganizanto raportos pri la tuta projekto kaj diskutigos la kongresanojn pri la rifuĝinta problemo kaj ties sekvoj.

Maja Tišljar

## FRANCA E-KONGRESO EN MANDRES-LES-ROSES

Ĝi okazos de la 25-a ĝis la 28-a de majo.

Legu detalojn: <http://kongreso2017.esperanto-france.org/>

Sabaton eblos partopreni ginget-vesperon, kun loka orkestro por danci. La gingetoj estis tipaj malmultekostaj restoracioj, kie oni ankaŭ dancis. Ili multe disvastiĝis en la 19a jarcento ĉirkaŭ Parizo. Ili staris ĉe rivero, kie oni povis bani kaj kanti. Dimanĉe en bela sezono, miloj da parizanoj kun familio aŭ amikaro trajne veturis al antaŭurboj por manĝi, trinki kaj sin amuzi.

Aleks Kadar

## AVE (ASOCIO DE VERDULOJ ESPERANRISTOJ) EN TUTMONDA KONGRESO DE VERDAJ PARTIOJ

AVE partoprenis la komunan kongreson de la tutmondaj kaj de la kontinentaj federacioj de Verdaj Partioj, kiu okazis de la 29-a de marto ĝis la 2-a de aprilo en Liverpool (Britio). Deĵoris 3 AVE-anoj (Manfred, Marteno, Ronaldo) kun forta subteno de 2 lokaj samideanoj Peeter kaj Brendon el Liverpool.



En la program-broŝuro troviĝas konciza teksto pri Esperanto kaj Verduloj. Ni renkontis 3 pliajn samideanojn kiuj aktivas en sialanda Verda Partio (Sally, Diana kaj Stephanie); krome plurajn kiuj iam eklernis Esperanton, inter ili Reinhard Bütikofer, MEP. Do, entute pli ol 10 samideanoj partoprenis la kongreson de ĉirkaŭ 2000 personoj. Kaj kompreneble ni havis la eblecon informi multajn pri la avantaĝoj de Esperanto servi kiel justa lingvoponto. Nur malmultaj diris ke ili tute perdis la esperon ke Esperanto iam povus servi

ĝenerale kiel lingvo-ponto. Kaj pluraj miris kaj stumblis pri la nesimetria genra sufikso -in-! Ni informis pri Esperanto pere de informtablo kaj informpanelo. Sur la panelo troviĝis:

- informŝildo kun nia emblemo kaj „Asocio de Verduloj Esperantistaj“ kaj „Assn. Esperanto Greens“;

- bela afiŝo en pli ol 100 lingvoj „PACO estas ...“, tre taŭga por koncize montri kaj voĉlegi;
- afiŝo de la germana „Die Grünen“ el 1984 kiu montras ĉielarkon kaj „Atomenergie – Nein Danke!“ en 40 lingvoj, inter ili en Esperanto;
- afiŝo pri 100-jariĝo de Esperanto kun la foto de L.L.Zamenhof.

Ni montris verdpartiajn dokumentojn en Esperanto, krome literaturon kiel Monato, Esperanto (de UEA), lernolibron de Stano Marček, romanon de Heinrich Böll, broŝurojn pri budhismo, de TEVA, ktp.

Du apartaj surprizoj okazis:

1. Dum la kunsido de la Tutmonda Verda Junularo, kie grava lingva problemo montriĝis, Stephanie proponis Esperanton kiel ebla solvo, al kiu respondis iu alia, ke ja ekzistas informtablo pri Esperanto en la informo-foirejo.
2. Green Left, maldekstra grupo de la Verda Partio en Britio, okaze de la lasta baloto por la Eŭropa Parlamento disdonis insignon kun la subskribo „Elekti Verdulojn“ en 8 lingvoj inter ili estis Esperanto!

La kongreso estis tre bone organizita en la bela kaj bone taŭga centro je la Mersey-rivero. Liverpool montras multifacetan bildon kaj survojas modernigi. La kongresanoj laboris en pluraj plenkunsidaj sesioj kaj multaj paralelaj kunsidoj, vespere estis kulturaj eventoj – kompreneble ankaŭ de Beatles. Nun ni tradukas la komunan „Deklaron de Liverpool“.

Manfred Westermeyer

## **HISTORIO DE REZOLUCIO DE POLA PARLAMENTO LA 7-AN DE APRILO 2017 PRI MEMORIGO DE CENTA MORTDATREVENO DE LUDOVIKO ZAMENHOF**

La 3-an de februaro 2016, la Parlamenta Komisiono pri Kulturo ricevis dokumenton nr-o 263, kun aldonita projekto de komuna rezolucio de 23-persona grupo de parlamentanoj kun peto pri decido nomi la 2017-an jaron Zamenhofa jaro en Pollando. En parlamentaj dokumentoj videblas, ke ĝi estis direktita al la unua legado. Kaj fine – nenio okazis plu kaj tiamaniere finiĝis la oficiala vojo de la dokumento ricevita de Kancelario de Parlamenta Komisiono de Kulturo antaŭ unu jaro kaj du monatoj.

Multaj intervenoj dum tiom longa tempo restis sen respondo kaj ago, kvankam krom multaj skriboj kaj telefonoj de iniciatinto – Kazimiro Krzyżak (CEM-ano), niaj anoj kontaktiĝis eĉ kun ĉiuj komisionanoj, petegante ilin pri la decido. Ne venis respondo.

La nuna decido de Pola Parlamento estis por ni surprizo – ni tre ĝojas pro la rezulto, kvankam samtempe malĝojas, ĉar estas klare videbla la malbona kunlaboro de esperantistaro en Pollando, se ni – tre fervoraj kaj engaĝemaj movadanoj - CEM-anoj, eksciis pri la evento pere de TV-ekrano. Ĝi montras ankaŭ politikan situacion en nia lando, malegalecon de civitanoj, neglektadon de iniciatoj prezentitaj de landanoj, kiuj prezentas alian pensmanieron ol la reganta partio Juro kaj Justeco. Kia estas JUSTECO en nia lando, se ne donas efikojn valoraj kaj konvinkigaj iniciatoj, se ili venas ne de PIS-anoj?

Mi dankas al Marian Zdankowski (el Olštino), kiu sukcese aranĝis la parlamentan grupon por tiu ĉi rezolucio. Sed mi ankaŭ kore dankas al Kazimiro Krzyżak (Gdynio) kaj Gizela Matray (Lodzo), kiuj batalis por la samo pli ol unu jaron – sensukcese, ĉar li ne faris tion nome de la decidanta politika partio PIS (Juro kaj Justeco).

Laŭ mia opinio – la unua provo fiaskis pro la fakto, ke 23 subskribintoj ĉe la unua dokumento, estis/estas konataj kiel gvidantoj de opozicia kampo – ili apartenas al partioj: Civitana Platformo kaj Nowoczesna (Moderna).

La nunan rezolucion parlamentan oni aranĝis nur dum 2 tagoj – bonvolu kompari la daton de ricevo de la dokumento en Parlamenta Kancelario (5.04.2017). Sufiĉis nur 2 tagoj por 17 politikistoj de la reganta partio Juro kaj Justeco, kiuj postulis „Memorigon de Ludoviko Zamenhof okaze de Lia Centa Mortodatreveno”.

Laŭ vortoj de nia Majstro: fino bona – ĉio bona!  
Kial do mia ĝojo estas iom amara?

Halina Komar

## BELGAJ VERDAJ SKOLTOJ REKLAMAS ESPERANTON

Dum la sekvontaj monatoj la Verdaj Skoltoj multe reklamas kaj informos pri Esperanto:  
 - 22an de aprilo: informado en Tournai kun la asocio ANAMA - *kvanto da partoprenantoj ne konata*



- 4an de majo: fulmkursoj en bazlernejo en Mouscron - *al 4 klasoj, 80 infanoj inter 8 kaj 10 jaroj*
- 13an de junio: fulmkurso por mezlernejoj de Internacia Montessorri-lernejo - *al 30 multlingvaj adoleskuloj inter 14 kaj 17 jaroj*
- 7-9an de julio: informbudo kaj fulmkursoj dum LaSemo (24 horoj da prezento!) - *lastjare ni informis pli ol 200 personoj kaj rikoltis 73 retadresojn, ĉi jare ni celas la duoblon!*

Por efike informi kaj varbi, ni preparas etan broŝuron. Ĝi estos aktualigita kaj belgigita versio de "Esperanto en poche" / "Esperanto zo op zak".

Vi povas vidi ekzempleron ĉi tie : <http://esperanto.bretonio.free.fr/pakeo.htm> por la franca versio, kaj <http://esperanto-nederland.nl/ned/temp/Esperanto-zo-op-Zak-2014.pdf> por la nederlanda.

Doumont Valère

## Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de aprilo 2017

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Maja Tišljár, Lu Wunsch-Rolshoven, Peter Zilvar, Zsófia Kóródy, Renato Corsetti, Nika Rožej, Aleks Kadar, Manfred Westermeyer, Halina Komar, Doumont Valère

Kontakto: [ztisljar \(ĉe\) gmail.com](mailto:ztisljar@ce@gmail.com)

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

